GISTO, JUL-2008.
Strato Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas: ottovaske@ibest.com.br
Legaĵo donaca por la ĉeestantoj.
Ceteraj anoj sentu sin ŝuldaj

07070707070707070707070707070707070707070707070707070707070707070707070707070707

ĈARMA VERDKAFA ETOSO.

Iom tima ke mi troige altetaksas nian tradician ĉiumonatan kongreseton, mi surpaperigas kelkajn erojn de nia junia kunsido. Honoris grizulojn kaj junulojn nia kara GEA-prezidanto Marcelo post longa forrestado kaj plie, li promesis de nun ofte trinki kafon, vinon dumvintre kaj bieron dum varma jarsezono. Tion oni aplaŭdas kaj lin pagigos plenumon de la promeso. Inst.Cezar disdonis la GEA-periodaĵon Gaŭĉa Stelo ĉiam kun memorigo pri la kunsidejo kaj ĝia adreso.Dankon! Mi kunportis plurajn interesajn legaĵojn el kiuj la kompanoj rajtis elekti po unu laŭ sia alvenvico. Ili, alportitaj nialanden far la gaŭĉa londonano Lenio, havas prezon: kompromiso sendi al li kvitancon surpaperan aŭ pere de la e-poŝto. Ties adreso troveblas en la Jarlibro de UEA. Cezar disdonis ankaŭ surpaperan raporton pri la unua Lingva Festivalo en Ĉinio, Nanjing. Partoprenis ĝin pli ol dek tri mil ĉinoj!!. Se tiaj festivaloj allogas tiom da interesatoj, ni devus laŭeble interesiĝi pri ĝia enhavo kaj ankaŭ iniciati brazilan festivalon.

HELPEMO

Plaĉas konstati ke inter niaj rondanoj troveblas helpemaj homoj kiam rilatas al nuligo de la elspeza konto. Ĝi iom altas kiam oni mendas kruĉon da abona vino servata en Tutty's. Mi dankas la atentajn amikojn kiuj zorgas por ke mi ne senmonigu ĝis la grado ke mi devus piedire atingi mian hejmon! Koran k varman dankon, miaj karaj!

KARESA ORELTIRO

Certe mi interpretas la senton de ni ĉiuj verdkafanoj: ke la geedzoj Zaghetto meritas oreltiron pro avaremo. Zelja ne timu ke, mi forgesis la frustraĵon iam suferitan en Tutty's, kiam vi kunportis sindone bakitan kukon, por festi iun daton, sed la mastro de Tutty's ne permesis frandi ĝin, kun trinkaĵoj tie akiritaj, malgraŭ fortaj argumentoj far Rejnaldo, ke tiu lunĉejo ne proponas kukojn. Mi referas al pli valora trezoro zorge kaŝita, nome, via knabino de mi antaŭlastan fojon vidita nur kiam ŝi estis eble naŭ- aŭ dekjaraĝa. Nun, VK-sabaton la zorgema paĉjo decidis vidigi ŝin, la fraŭlinon Danuta, familiare, Danjo. Nuntempe ŝi preferas ne plu esti menciita knabino, pro ŝia altnivela kaj memrega personeco. Laŭ mi komprenis, ŝi aktorinas en iu teatrogrupo en Porto Alegre. De la unua ekvido eĉ grizuloj enamiĝas al tia belulino. Ŝi hantas. geZaghetoj, mi povas evalui viajn grandan zorgon pro la "akcipitroj' kiuj sieĝas vian hejmon! Ĉu la gepatroj ne indas oreltiron pro ilia troa avareco inter gesamideanoj? – Ni preĝu por ke ŝi ne levu sian nazon kaj fordanku la amikecon de olduloj. Sabaton, ŝi ankoraŭ

modesta, disdonis survangajn kisetojn al ĉetablaj amikoj. Bedaŭrinde ne plu restis tempo por sidiĝi inter ni dum kelkaj minutoj. La mastro horloĝo malpermesis tion fari. Domaĝe la geZaghettoj ne priatentis peton iam de mi riskitan: “Fabriki” por ŝi fraĉjon, italidecan, kun emo fariĝi kantisto kvazaŭ L.Pavarotti!!.

AMARA SCIIGO

Iom antaŭtagmeze de 09/07/08, alveninta hejme mia edzino diris: telefonis Miriam. Tio surprizis. Malofte ŝi kontaktas min – Kio grava okazis?. La informo estis, ke nia plej sindonema kaj diligenta Elizabeth forpasis lastan vendredon, do la kvaran de julio Por havigi al mi detalojn mi provis kontakti ŝian fratinon Roza, vane.
Certe nia asocio GEA zorgas por informi la revuon Esperanto, forpasoj kiuj okazas.Ankaŭ la perdon de nia batalema gaŭĉa ankoraŭ juna esperantistino kaj instruistino Elizabeth Diehl el nia trančeo.Lastfojan kontakton, dum junio, mi rimarkis ke ŝi parolis iom senkonvinke sed ne plendis pri io ajn.

PROFESIO, FRAŬLINECO

Laŭ analizo, legita en ina periodaĵo, moderna fraŭlino ne zorgas pri edziniĝo, profesie ŝi sukcesplenas, restadas sendependa, seksaktivas kaj preteratentas tabuojn ĝis hazardo favoras la feliĉigan duopan finalon. Ĉu ŝablono por la nuna generacio?

RARA FAKTO

Kelkajn tagojn antaŭ la 8/7/08 oni telespektis informon pri rarega okazintaĵo, internlande de Brazilo. Naskiĝis bebo kiu kreskis ne en la patrina utero sed jes pli supre, apud la koro kaj stomako, laŭ presaj informoj. Laŭ mia eta scio pri inaj generaj organoj, tia fakto povus okazi nur far ago de sciencistoj, eksperimentacele ĉar ja ne ekzistas trairejo de la utero, eksteren. Tagojn poste, en kafejo estiĝis ŝercaj spritaĵoj far neniofarantoj, rilataj al la spektita kazo, inter ili la mencio, ke la patro sukcesis planti homsemon en la patrinan sinon, ne forgesinte aldoni ke la plantila longo certe superas tiun de italidoj.

PENSIGA DEMANDO

Kial en la brazila N-Oriento ekzistas pokaj NROj = Ne-Registaraj Organizoj?; en la brazila Amazonio, da ili estas pli ol en la tuta afrika kontinento kie malsato, soifo, militoj, AIDs, Ebola, masakroj kaj enterigitaj minoj turmentadas la loĝantaron?!

IRU FOR! (pluraj tradukoj)

Oni imagu la situacion: vi riparas ion ne kutiman, la afero ne iras glate. Proksimiĝas amiko, ŝercemulo. Li vin aŭdigas tute erarigajn sugestojn, kvazaŭ seriozajn, ĝis via pacienco elĉerpiĝas. Vi diras al li/ŝi: aĥ, iru for! Nacilingve: va(i) embora! Kvazaŭ: “Te manda...vá ver se estou lá na eskina” aŭ, malaperu, iru kontroli ĉu mi staradas ĉe la stratangulo! – Jen kion mi kolektis, itale: “va via!” – Hispane, “andate, vá!”- Germane, “Du, ge mal los! (gehe mal los!) – Svise, “gang ma los!” Ĉi-lasta, pro la dialekto svis/germana, imperativamode misformas la verbon. “Gehe(iru) al “gang” – Tio sonas iom drole al homoj ne kutimiĝintaj al tia parolmaniero. Estus interesse ekkoni la saman

Paĝo tria.
bonaniman forpelmanieron en aliaj lingvoj.

Gisto proponas tradukaĵon de interesa teksto el ĵurnalo:

ENNEBULAKNABINO,iom kurtigite.
(Far Liberato Vieira da Kunja)

Raras vidi defili en la griza ĉiutagaĵo de vintro unu nuran momenton de pura ĉarmo. Tio okazis al mi lastan sabaton sur la eble plej larĝa avenuo de Porto Alegre. La semaforo ruĝis, la aŭtoj haltis obee por spekti la transiron de unu sola piedirantino. Ŝi, ĉirkaŭ 20-jaraĝa, estis iom superreala dum ŝia strata transiro.Ŝi portis kolorajn vestaĵojn kiuj kontrastis la grizon de la mateno. Ŝi tiradis post si valizon sur radetoj similaj al tiuj multe vidataj en flughavenoj. Ŝi ne urĝis, ŝi transiris la kvar trakojn kiuj situis antaŭ mi. Kiam ŝi preteriris la bedon kiu disigas la aliflankajn trakojn ŝi ekflamis pro eklumo. Eta sunradio trarompis la nebulon kaj elstarigis ŝian eksterordinaran belecon. Mi preskaŭ forgesis spiri ekvidinte ŝin tiel bela trairanta aplombe kaj senzorge la duan trotuaron de la avenuo. Prilumata ŝi atingis la trotuaron, momento kiam mi perdis ŝin. La semaforo estis verdiĝinta kaj la aŭtoj ekrapidis impete. Kiu restis senmova estis mi, t.e., mia aŭto moviĝis tra aliaj stratoj, aliaj vojkruciĝoj sed ene de mi restis netuŝita la lumo de la knabino en la tuto de ŝia fascínia belformo. Jen, belformo, vorto antikva kiel serenado eksmoda sed, mi ne trovas alian dirmanieron por rakonti la spektindaĵon. Tiu ineto hantas mian tagon kaj alkatenis min al demandoj senrespondaj – De kie ŝi venis? Ĉu de sia unua amornokto kun sia enamiĝanto? Kien ŝi iris? Ĉu al flughaveno forflugi en ruĝa aviadilo kiu levis ŝin preter kaj super la nubojn kie ĉio bluas? Kiu igis ŝin linda ĝis la grado ke la suno degnis trapenetri la julian nebulon? Ĉu ŝia magia Carmo?
Neniam mi ekscios sed scias ke, dum momento estiĝis printempo en nia vintro.

AĈA AFERO

Samideanoj ŝanĝas siajn e-adreson sed ne ĝustigas ĝin en la GEA-adresaro.Roberto kaj Lucio apartenas al ili. Oni volas komuniki ion oportunan sed rompas sian nazon ĉar la msg revenas. Memoru ke foje povas okazi grava motivo kies oportuno perdiĝas.

LENIO

Hodiaŭ 05/07, nia gaŭĉa londonano Lnio reaperis en la retejo, post longa turistado tra EU. Klaĉemuloj flustras ke li amindumas en Francio. Riĉuloj amas altnivele. Li ne aŭdigis sin en EkoLink. Mi volas aŭdi lian opinion pri radio,malsama ol tiu 897, pli taŭga por forgesemulo kiel estas ĉi Matusamem-kandidato hi...hi...hi.

AĈA AFERO

Oni decidas per e-mail kontakti geamikojn, trovas e-adreson, sendas msg sed baldaŭ venas respondo, ke la adresato estis ne trovita... – Tio okazis al mi post sendi msg al amikoj enhavataj de GEA-adresaro. BV zorgi, miaj karaj! Ni interrilatas tro malmulte, eble tial nia anaro estas tiel indiferenta, unu al la ceteraj.

TABUO

Dum nuntempaj maturaj homoj aĝis 20/30 jarojn, interparoli pri seksaj aferoj estis hontiga tabuo. Hodiaŭtempe oni aŭdas anoncon de klinikoj, kiuj proponas ĥirurgiojn por igi la piĉojn belaspektaj kaj provizi memfidon al virinoj sed neniŭ eĉ paŭtas. Krom teatro ekzistas organizitaj ejoj kiujn vizitas viroj kaj inoj, kie okazas eksplicitaj plurparaj seksrilatoj. Eble tial, la mondo fariĝas granda bordelo ĉar ĉirkaŭ 40% de la junuloj kiuj geedziĝas

decidas disiĝi post 2 aŭ tri jaroj. Pro la duboj, multaj preferas kunloĝi sen oficialigi geedziĝon. El tio rezultos ke venontaj generacioj ignoros parencecon!.

TRADUKAĴO

(Ĉu vi kutimas legi la kolumnon de la fama Ĵuremir M.Silva, en Correjo do Povo? Jen specimeno pri lia vervo):

INGRID BITANKURT

Ne ekzistas io pli aĉa ol forpasa admiro al fantaziaj personecoj, la obstina fiksiĝemo de amaskomunikiloj en kreado de reĝinoj, diinoj por malsovaĝigi homamasojn kaj transformi ĉiujn en ebriajn subulojn. Konfesas mi, tamen, ke ofte mi moliĝis kiam mi pensadis pri Ingrid Bitankurt. Mi, kiel iu ajn, ne pravis eĉ sonĝe pensi pri iu kolombia ino sekvestrita de gerilanoj. La mondo ja plenas de malfeliĉo kaj ni ĉiuj fariĝas indiferentaj. Malgraŭ tio, laŭ la kliŝo, al arbo katenita, ege magra, malsana, trista, tre trista, korpremita sen espero pri eskapo. Mi serĉis pri ŝi informojn en la retejo. Tiu ŝia bildo, kun klinita kapo, senanima, kapitulaca, kiu inundis la mondon fiksiĝis sur mian retinon. Eĉ kelkaj larmoj eskapis kiam aliaj ostaĝoj estis liberigitaj sed ŝi restis alkatenita.

Finfine Ingrid estas libera. Tion faris la kolombia armeo de la prewzidento Álvaro Uribe. La plej granda triumfo tamen havas pokan politikan signifon. Okazas reveno de virino inter siaj hejmanojn. Ĉu ĉiu jam iomete rezonis pri la suferoj de Ingrid dum la jaroj pasigitaj en kaptiteco? Ĉu eblas ekzisti motivo por pravigi metodon tiel brutecan, malhoma torturo absoluta, jaraj torturoj, monatoj, tagoj, minutoj, sekundoj, torturo fiziologia, spirita. Torturo ek de certa momento, foresti ĉiam, aŭ morta, tie en iu loko kvazaŭ korpo kaj menso disigite gustumus en lanta malaperado, sen elirejo kaj senkulpa. Nek la motivo de la sekvestrantoj rezistis al la tempo. Torturo pro esti, torturo pro la ekzisto. La vivon pasigante kvazaŭ pasinta, daŭre. Ĉiun tagon kiun ŝi perdis de la vivo, de torturata viktimo de ago kaj malago.

Mi imagis ŝin kiel rolanton de Gabriel G.Marques “Izabel vidanta pluvi en Makondo” lante fariĝanta musko,likeno, vegetalo, aliformiĝanta en arbon,folion, greson. Ingrid sen vitra aperturo, mortanta en amazonio, pluvo senfina, vaka, animprema. Daŭre elstaras la persistemo de la karceristoj, firmaj tagojn post tagoj, garde al prizonuloj sen kondamno, sen puno, sen krimo. La konvinko estas kvazaŭ kradoj. Mi koleras kaj kompatas samtempe tiujn monstrojn, torturantojn. Koleras kontraŭ ni homoj ĉar ni ne inventas la plenan solidaron. Ŝia rideto kaj peto ke la vivo de la monstraj gerilanoj estu ŝparitaj elmontras virinon maturan kaj serenan. Ŝi eble lernis tion de la arboj kaj de la pluvo, ne de la gerilanoj.

Ridetu

ANTAŬZORGO

Du amikinoj renkontiĝas, babilas kaj temas pri gravedeco. Diris unu “ Nun, pli ol iam ajn, mi devas ege zorgi por ne gravediĝi – “Sed, vi diris ke via edzo submetiĝis al vazektomio”–“Ĝuste pro tio, mia kara”.

DURMIENA AMIKO

Senlaboraj artistoj elpensas, manieron reveni sur scenejon. Jen, kion mi elpensis, diras unu: “Ni consistigu kaj prezentu vivan revuon kaj proponas:”La kurteno leviĝas, mi rakontas kelkajn anekdotojn, sekve la kurteno malleviĝas; poste la tuko denove leviĝas, mi kantas kelkajn muzikojn, la kurteno descendas. Tuj poste la ekrano leviĝas kaj mi... – “Momenton” protestas la amikoj. “Kaj ni, kion ni faros?” – “Aĥ karaj, sciu ke la kurteno ne leviĝas kaj mallevigas aŭtomate...”